Kvindek jarojn de Esperanto en Usono kaj Kanado! Vere, estas notinda afero. Ne multaj landaj asocioj povas fieri pri tiel daŭra agado. Ŝajnas al mi, ke tio nur substrekas la konatan volontecon de ni novmondanoj subteni la movadojn, kiuj alportos nian plendeman mondon pli proksime al la paco kaj frateco kiun ni tiel deziras. Precipe ni mem sentas tiun fratecon, kaj ni kune kunvenas jare por demonstri nian kredon pri ĝia fina venko, kaj por renovigi nian propran fidon pri la utileco de Esperanto por atingi tiun celon.

Ankaŭ ŝajnas al mi ke Milwaukee estas urbo, kie tiu fido povas fariĝi realaĵo. Dum ĝiaj jaroj de ekzisto, nia urbo estas bonveninta homojn el preskaŭ ĉiuj nacioj en la mondo, kaj ili estas donintaj al Milwaukee kosmopolitan atmosferon, kie toleremo estas la signovorto kaj espero estas la kredo. Ni urĝas, ke vi venu. Ni etendas niajn manojn de bonveno.

Loka Kongresa Komitato:

Jarvis E. Bush Cecile Pollatz
Anthony Nabby Solveig Andersen
Jon B. Willarson Arline Haertle



JARVIS E. BUSH

JARVIS E. BUSH

Prezidanto

D-RO SHINODA, GASTO DE HONORO JE LA JUBILEO



D-RO HIDEO SHINODA

Ni ĝojas anonci, ke la eminenta Esperantisto kaj famkonata medicinisto, D-ro Hideo Shinoda el Japanujo, ĉeestos nian Oran Jubileon kiel nia gasto de honoro. Li estas Prezidanto de la Jamagata Esperanto-Klubo, kunlaboranto de la *Medicina Revuo*, verkisto en Esperanto, membro de TEKA, ISAE, ktp.

Niaj membroj ĉe la Kongreso ĝuos kaj profitos pro lia partoprenado. D-ro Shinoda kunportos kun si naturkolorajn filmojn kun Esperanta komentario, kiujn li montras ĉe la Kongreso en Milwaukee. Unu estas pri la Jamagata Esperanto-Klubo, alia pri la urbo Jamagata, kaj alia pri kolorriĉaj floroj.

D-ro Shinoda superas en la fakoj de ginekologio kaj obstetrikio, kaj li estas famkonata kirurgo pro sia sperto pri operaciaj procedoj.

Post sia vizitado en Usono, kaj partopreno en la Jubilea Kongreso, D-ro Shinoda vizitos Eŭropon kaj ĉeestos la Universalan Kongreson en Bolonjo, Italujo. Lia ĉeesto ĉe la Kongreso en Milwaukee donas aldonan kialon por la ĉeesto de ĉiuj Esperantistoj. Pretigu vin por nepre esti inter la multaj celebrantoj ĉe la *Ora Jubileo de EANA*.

LA VORTARO DE ESPERANTO – FAKTOJ KAJ OPINIOJ

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

LA kvara eldono de la *Plena Vortaro de Esperanto* aperis en Paris en 1954 (511 paĝoj) kun 63-paĝa *Suplemento* kompilita de Profesoro Gaston Waringhien, Akademiano. Fine de 1954 ankaŭ aperis la *Matematika Terminaro* de D-ro C. M. Bean, unue en la Dua Parto de la Jarlibro de UEA, poste kiel memstara 39-paĝa volumeto. Oni anoncas la baldaŭan publikigon de du tre ampleksaj verkoj: la unua volumo de *Ilustrita Vortaro de Esperanto* (A-K, 640 paĝoj), de Francisco Azorín en Meksiko (kun Donald R. Broadribb kiel helpredaktoro), kaj *Scienca kaj Teknika Terminaro*, verkita de Ing. Rudolf Haferkorn en Germanujo (en kunlaboro kun D-ro F. J. Belinfante en Usono kaj aliaj), presata en Japanujo.

Estas ankoraŭ neeble diri multe pri la lastenomitaj du verkoj, ĉar ili ankoraŭ ne aperis. La unuajn du mi trarigardis kun granda intereso, intencante verki recenzojn. Sed baldaŭ miaj notoj tiel multiĝis, ke mi hezitis komenci laboron. Evidente la spaco en *Amerika Esperantisto* ne sufiĉus. Fine mi konkludis, ke eble estus pli utile kaj pli interese por la legantoj, se mi skribus nur pri kelkaj aspektoj de tiuj libroj, uzante mian raporton por prezenti kelkajn pli ĝeneralajn rimarkojn pri la Esperanto-vortaro kaj ĝia evoluo.

Unue mi volas doni kelkajn faktojn pri la *Plena Vortaro*. La ĉefa parto estas senŝanĝa represo de la dua kaj tria eldonoj. La *Suplemento* enhavas ne nur vortojn netroveblajn en la antaŭaj eldonoj, sed ankaŭ kelkajn aldonajn difinojn. En la nova formo la *Plena Vortaro* enhavas preskaŭ ĉiujn vortojn, kiujn leganto trovos en la Esperanto-literaturo beletristika, faka kaj ĝenerala. Ĉu ĉiuj tiuj vortoj estas necesaj aŭ rekomendindaj, estas alia demando. Sendube multaj uzantoj konsentos kun Akademiano C. Butler, kiu en *The British Esperantist* nomis la verkon *Troplena Vortaro*. Malgraŭ kelkaj kritikindaĵoj, pri kiuj mi ankoraŭ parolos, la verko estas tre zorge preparita, presita sur bonega papero, bindita en altkvalita fleksebla tolo, en poŝformato. Mi urĝe rekomendas ĝin al ĉiuj Esperantistoj kaj ĉiuj, kiuj serioze studas Esperanton. (La prezo estas \$ 3.35 afrankite, de EANA.)

Pri la *Matematika Terminaro* de D-ro Bean mi nun volas diri nur, ke la publikigo de tiaj fakterminaroj estas laŭdinda servo de UEA. Se vi fariĝas individua membro de UEA, vi ricevos de tempo al tempo en la Jarlibro, tiajn verkojn sen ekstra pago. Verketoj jam eldonitaj de UEA kaj ankoraŭ haveblaj estas: *Marista Terminaro* de P. Clissold, *Fervojna Terminaro* de E. M. Rosher, *Kudra kaj Trika Terminaro* de M. kaj V. Verda (haveblaj de EANA, kvar volumetoj kune, \$ 1.20 afrankite).

Laŭ la *Antaŭparolo* de Profesoro Waringhien en la *Suplemento*, *Plena Vortaro* enhavas 7,866 radikojn, inter ili 966 en la *Suplemento*. El ili 4,425 estas Fundamentaj kaj Oficialaj radikoj. Do 3,441 estas neoficialaj. La plimulto el ili estas internaciaj vortoj, kiuj apartenas al Esperanto laŭ la 15-a regulo de la Fundamento kaj pri kiuj oni ne bezonas diskuti aŭ disputi. Pri aliaj – kaj pri la difinoj de sufiĉe granda nombro da vortoj – diversaj opinioj estas eblaj.

Oni ofte aŭdas aŭ legas opinionon, ke la Akademio de Esperanto devus

oficialigi pli grandan nombron da vortoj, labori pli rapide kaj grandskale, kaj publikigi Oficialan Vortaron kompareblan en amplekso al la *Plena Vortaro*. Oni ne forgesu tamen, ke la *Plenan Vortaron* redaktis Profesoro E. Grosjean-Maupin, tiutempe Direktoro de la Sekcio "Komuna Vortaro" de la Akademio, kun la helpo de tri membroj de la Lingva Komitato (A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien), kaj ke ses Akademianoj (Canuto, Kamaryt, Lapenna, Neergaard, Støp-Bowitz, Waringhien) estas inter la kunlaborantoj de la *Suplemento*.

La Akademio mem nun laboras pri difinoj de la oficialaj vortelementoj. Presita listo de proponitaj difinoj de ĉiuj vortelementoj kun la komenclitero "a" estas dissendita al la Akademianoj por ilia aprobo. Oni povas antaŭdiri, ke ĝi estos oficialigita post kelkaj monatoj. Neeviteble multe da tempo forpasos ĝis fino de la laboro pri vortoj kun komenclitero "z". Kiam ĝi estos preta, la Oficiala Vortaro, kun difinoj, sendube estos grava dokumento utila por la unueca uzo de Esperanto. Sed ĝi ne estos "plena", ĉar la Akademio oficialigas nur vortojn jam sufiĉe elprovitajn en praktika uzo kaj ĉar la vortaro enhavos nur la radikojn, ne la kunmetitajn vortojn, kiuj plenigas la pli grandan parton de ordinara vortaro. Neniu do prokrastu aĉeton de la *Plena Vortaro* ĝis la tempo, kiam la Vortaro de la Akademio estos havebla!

La fakto, ke mi menciis la *Plenan Vortaron* kaj la *Matematikan Terminaron* en la sama alineo, ne signifas, ke ili estas same valoraj kaj fidindaj. La *Plena Vortaro* estas tre zorge ellaborita verko kaj produkto de longega sperto. La *Matematika Terminaro*, kvankam utila kaj valora, estas en kelkaj rilatoj nur eksperimenta. Fakte mi preferus, ke la aŭtoro estu prokrastinta ĝian publikigon iomete, por havigi al si la konsilon kaj helpon de diverslandaj fakuloj.

La sekcio (s), pri statistiko, en *Matematika Terminaro*, evidente estas verkita sen atento pri la *Malgranda Statistika Terminaro* de la Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistiko, publikigita en Rio de Janeiro en 1947, (havebla de EANA, en libro pri statistiko, \$1.90 afrankite – vidu piednoton *). La terminoj rekomendataj en la *Malgranda Terminaro* ĝenerale estas preferindaj ol tiuj de la *Matematika Terminaro* kaj pli bone harmonias kun la vortoj en la *Plena Vortaro*, ĝia *Suplemento*, kaj aliaj Esperanto-vortaroj. Jen kelkaj ekzemploj:

MALGRANDA TERMINARO	PLENA VORTARO	MATEMATIKA TERMINARO
mezonombro	mezonombro	mezumo
aritmetika meznombro	aritmetika mezonombro	averaĝo
geometria meznombro	geometria mezonombro	geometria mezumo
harmonia meznombro	harmonia mezonombro	laŭinversa mezumo
mezvaloro	---	laŭampleksa mezumo

Strange estas, ke D-ro Bean diras pri *averaĝo*, ke ĝin proponis D-ro Olav Reiersol, Profesoro en la Universitato de Oslo. Aliflanke la sama Profesoro Reiersol estis la "respondeca kunlaborante pri statistiko" por la *Suplemento* -- kiu uzas la terminon *aritmetika mezonombro*.

Kompreneble la *Matematika Terminaro* ankaŭ enhavas kelkajn statistikajn terminojn, kiuj saĝnas esti preferindaj ol tiuj de la *Malgranda Statistika Terminaro*, ekzemple *devio*, kaj *ekarto*, por kiuj la *Malgranda Terminaro* uzas la tro ĝeneralan vorton *eraro* kun diversaj adjektivoj.

Amerika Esperantisto eble ne estas oportuna loko por diskuti deta-

lojn de faka terminaro, sed mi deziras fari kelkajn ĝeneralajn rimarkojn pri la tendenco enkonduki fakajn terminojn iomete, sed ne multe, diferencajn de vortoj en la komuna vortaro. Ŝajnas al mi, ke tiu tendenco emas fari pli multe da malbono ol da bono, ĉar la vortoj proponataj povas konfuzi la uzantojn de Esperanto.

Ekzemple, flanke de la oficiala vorto *tangento*, D-ro Bean proponas la terminojn *tanĝanto* kaj *tangenso*. S-ro Rosher, en la *Fervoja Terminaro*, proponas la vorton *tanĝento*. Jen do kvar tute similaj terminoj: *tangento*, *tanĝento*, *tanĝanto*, *tangenso*, ĉiu kun aparta difino. Sed kiel oni evitos konfuzon inter la uzantoj? Eble oni bezonas la du terminojn *tangento* kaj *tangenso*, sed estas utopia ideo, ke oni povus havi apartan vorton por ĉiu ideo. Kiel la naciaj lingvoj, tiel ankaŭ Esperanto devas en multaj kazoj utiligi unu vorton en diversaj sencoj, se la lingvo ne devas fariĝi malfacila kaj tro komplikita.

Praktika sperto montras, ke la malmultaj "vortparoj" ekzistantaj en la oficiala vortaro de Esperanto ofte kaŭzas konfuzon inter komencantoj kaj eĉ iuj spertaj Esperantistoj. *Intereso*—*interezo*, *studento*—*studanto*, *fablo*—*fabelo*, *tablo*—*tabulo*—*tabelo*, *artiklo*—*artikolo*, *akordo*—*agordi*, *punkto*—*punto*—*pinto*, *trinki*—*drinki*, *kompromiso*—*kompromiti*, *kompenso*—*rekompenco*, *peza*—*pesi*, *maso*—*amaso*, estas la plej konataj ekzemploj. Tiaj "vortparoj" ekzistas en ĉiuj naciaj lingvoj, kaj ilia nombro en Esperanto ĝis nun ne estas tre granda. Mi opinias, ke ne estas konsilinde pligrandigi ĝin.

De tempo al tempo kelkaj usonaj Esperantistoj klopodas konvinki min, ke nepre bezonata vorto estas *prezidento*, apud *prezidanto*. Ne estas malfacile bone difini du tiajn vortojn, uzante la unuan por alta registara ofico, la alian por pli modesta funkcio. Sed en la plimulto de la naciaj lingvoj ne ekzistas apartaj vortoj por la du sencoj, kaj mi timas, ke, se oni oficialigus la radikon *prezident-*, la plimulto de la Esperantistoj ne respektus la diferencon en la ĉiutaga uzado de la vortoj. La Prezidanto de Usono kaj la prezidanto de sportklubo evidente ne estas samrangaj, sed ambaŭ prezidas, ĉu ne? La Sekretario de la Rockefeller-Fondaĵo kaj la sekretariino, kiu maŝinskribas miajn leterojn kaj raportojn, ne faras la saman laboron, sed tio ne signifas, ke ni bezonas novan terminon por diferencigi la du funkciojn.

La *Matematika Terminaro* proponas la terminon *forso* apud *forto*, kaj *Suplemento* enhavas la verbon *forci*. En *Matematika Terminaro* troviĝas *momento* anstataŭ *momento*, en *Suplemento* *momanto*. La *Matematika Terminaro* havas *rigresa*, *Plena Vortaro* *regresi*. La vortoparo *produkto*—*produo* jam troviĝas en sufiĉe multaj Esperanto-vortaroj, ĉar la trologikemuloj postulas distingon, kiun la angla, franca, germana kaj multaj aliaj lingvoj ne bezonas. Aliaj terminoj proponataj en la *Matematika Vortaro* kaj tre proksimaj al aliaj vortoj estas: *matrikso* (*matrico*), *determinento* (*determinanto*), *cirklo* (*cirkele*), *varianco* (*variante*).

Mi emas opinii, ke oni devus esti treege singarda pri la enkonduko de tiaj terminoj.

(Dua artikolo pri la sama temo sekvas.)

* "O Instituto Brasileiro de Estatística e o Esperanto", 70 paĝoj de valora Esperanta legajo inklusive 6 de la "Malgranda Statistika Terminaro", kaj 110 en portugala lingvo, luksa, ilustrita, grandformata, 180 paĝoj... \$1.90 afrankite.

ESPERANTA KRONIKO

En la oficiala Protokolo de Usona Parlamento la 16-an de Marto aperis pledo por Esperanto en artikolo memore al la 434-a datreveno de la vojaĝo de Magellan kaj lia alboriĝo en la Filipinaj Insuloj. La artikolo skribita de nia filipina samideano M. M. Villareal estis enmetita pere de S-ro Barrett O'Hara, Reprezentanto de la ŝtato Ilinojo.

La gazeto "Synchroscope" de la granda Kompanio Edison en Detroit, Mich., bildigis foton de Edward Sievers kaj rakontis pri lia entuziasmo por Esperanto. La foto montras S-ron Sievers (kun Esperantaj libroj sur breto kaj gazetoj sur muro) dum li montras al la devizo de la gazeto tradukita Esperante jene: "Sinkroskopo estas aparato kiu helpas la generatorojn de la elektra centrejo funkcii kune, kiel ĉi tiu gazeto helpas nin labori kiel teamo por la intereso de ĉiuj."

La Dana Ministerio por Eksterlandaj Aferoj forsendis dum Marto pere de siaj oficialaj informservoj 8-paĝan interesan manuskripton, verkitan tute Esperante, pri la fama aŭtoro Hans Christian Andersen. La 2-a de Aprilo estis 150-jara datreveno de la naskiĝo de tiu eminenta kaj amata "ŝpinisto de sortfabeloj".

La Esperanto-Societo de Milwaukee en kunveno de la 24-a de Februaro montris la filmon "Danlando". La grupo ankaŭ regalis la ĉeestantojn per arango nomata "Progreso-Konkurso", kiu restas ankoraŭ mistero por ni, sed verŝajne efika por la klubanoj. Ĉu eble la klubo povos klarigi la aferon al niaj legantoj? La Societo lastatempe eldonis hektografitan bultenon pri la lokaj kunvenoj, pri planoj por la Jubilea Kongreso, kaj kun sekcio titolita "Via Monata Esperanto-Leciono". Laŭdinda laboro!

Novaj kursoj de Esperanto komenciĝis lastatempe en Naperville, Ill., pro la energia laboro de *Ges-roj Roy E. Holland*. Tiu Esperantista paro gvidas jam tri kursojn, unu en la loka altlernejo, alian en sia hejmo, kaj la trian en la oficejo de S-ino Holland. Ili ankaŭ aktive partoprenas en la agado de la Esperanto-Societo de Ĉikago, kie S-ino Holland servas kiel sekretariino. Dum Februaro Ges-roj Holland pruntedonis al Biblioteko en Downers Grove, Ill., kaj poste enmetis en montrufenestrojn de du lokaj ĵurnaloj, efikan elmontraĵon, kiu prezentas grandan mondan landkarton kun fadenoj ligitaj al poŝtkartoj el 24 landoj, ricevitaĵi pere de Esperanto.

En ekspozicio pri flankokupoj (Hobby Show) sub aŭspicio de la loka Asocio de Gepatroj kaj Instruistoj (PTA), Alexandria, Va., prezentigis montraĵo pri Esperanto. *William Plampin* aranĝis la Esperantan budon por montri sian ŝatatan flankokupon de multaj jaroj.

Ni funebros la morton de Komandanto Richard E. Lambert, je la aĝo 67, la 28-an de Decembro en Plainfield, N. J. Komandanto Lambert estis veterano de ambaŭ mondmilitoj, kaj servis en la Usona Mararmeo dum 40 jaroj. Li unue interesiĝis pri Esperanto kiam li estis junulo, kaj aktive partoprenis kiel membro de EANA de post 1945. Li estis la aŭtoro de la broŝuro "Naskiĝo de la Universalista Kredo", eldonita de li en kopropero kun la Centra Oficejo de EANA en 1951. Ni perdis lojalan samideanon.

Dum la Jara Konferenco de la Asocio de Kluboĵ pri Internaciaĵ Rilatoĵ, 1-4 Aprilo, en St. Louis, Mo., la klubo de Kolegio Shurtleff, Alton, Ill., faris ekspozicion pri Esperanto. Pasintjare tiu kolegia klubo fabrikis serion da lumbildoj pri la celo kaj utileco de Esperanto kaj prezentis ilin antaŭ multaj organizoj. Tiu projekto formis la bazon de materialo por la ekspozicio.

En kunvenoj de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko, dum Februaro, Marto kaj Aprilo, oni aŭskultis la plej diversajn kaj interesajn paroladojn faritajn de membroj de la Societo: "Pri Pola Literaturo" de *Andrew I. Rogus*, "Historio de Japana Florarango" (kun demonstracio) de *S-ino Edna MacDonald*, "Averto pri Trompkomercistoj" de advokato *Henry Kruse*. Membroj de la Societo decidis je ĉiu alterna kunveno kune dediĉi sin al la plua studado de Esperanto el la studlibro "La Tuta Esperanto".

La Esperanto-Asocio de Nov-Jersio havis oportunon aŭdi la plenan historion pri "Esperanto kaj UNESCO" dum sia Februara kunveno, kiam *D-ro W. Solzbacher* paroladis antaŭ la grupo. En Marto la Societo ĝuis la prezenton de lumbildoĵ pri Esperanto.

Antaŭ la Komitato pri Eksterlandaj Rilatoĵ de la Usona Senato, kunveninta en Miami en Marto, *S-roj F. K. Immeke* kaj *F. W. Vedder* atentigis pri Esperanto kaj ĝia praktikeco por solvi la lingvan problemon.

Parolado kaj provleciono pri Esperanto estis ĉefero en la Februara programo de la Klubo por Viroj de la Universalista Preĝejo, Dearborn, Mich. *Joseph H. Murray* prezentis faktojn pri Esperanto kaj distribuis Esperantan brosuron pri naskigo de la universalista kredo.

Dek-kvar studentoj en la Universitato de Minesoto nun lernas Esperanton sub la instruo de nia juna agema samideano *Richard T. Vineski*. La kurso okazas sub aŭspicio de la Mond-Registara Klubo.

KANADA INFORMO

Frato Saturnin, S. C., instruisto de lingvoj en la Kolegio "Sacré-Coeur", Kebeko, sukcesis interesigi grupon de studentoj por studi Esperanton. Ili utiligas franclingvan lernolibron, ĉar la lingvo de la kolegio estas la franca.

En la katolika gazeto "Our Family", Saskatchewan, aperis bonega artikolo kun la titolo "Esperanto Is Easy", skribita de *William D. Ryan*. Poste, la poŝforma tutkontinenta gazeto "Catholic Digest", kiu havas pli ol 500,000 legantojn, reprenis la artikolon en sia Aprila numero.

Informpetoj en la franca lingvo ĉiutage envenas al EANA rezulte de leteroj en la ĵurnaloĵ "Le Droit", Ontario, kaj "Le Soleil", Kebeko. Ambaŭ leteroj estas skribitaj de *Harold Mason*.

En la ĵurnalo "Norwood Press", Manitobo, presiĝis artikolo pri Esperanto sub la titolo "Lingvo ne estas baro al uzantoĵ de Esperanto". Niaj samideanoĵ, *Ges-roj R. C. Palmer* atentigis nin pri la supra informo.

En Vancouver, B. C., *Ges-roj Bruce Forrest* daŭrigas sian intereson pri Esperanto, kaj donas sian hejmon kiel renkonteĵon por la loka grupo.



Fred L. Wharff: En novembro pasintjare fariĝis 87-jara. Unu el la plej malnovaj pioniroj de nia movado. Krom Esperanto, scipovas multajn aliajn lingvojn. Instruis Esperanton en la lernejo Montezuma, Kalifornio; en kursoj de la Universitato de Kalifornio; kaj unufoje ĉe konstrulaboro kazerno, la tiel nomata "CCC", en kiu partoprenis pli ol 100 junaj viroj. Nun loĝas kun sia bona amiko **John L. Spence**, kiu lernis Esperanton en 1936. Ili korespondas kun Esperantistoj en 70 diversaj landoj. S-ro Wharff uzas la Esperantan nomon *Kratago* kaj S-ro Spence la nomon *Ciklameno*, kaj tiel estas konataj al multaj siaj amikoj tra la mondo.

Julia May Leach: Unue interesiĝis pri Esperanto pro artikolo en la gazeto "Ladies Home Journal" en 1907. Poste aliĝis al la Bostona Esperantista Societo. En 1910 ĉeestis la Sesan Universalan Kongreson en Washington, D. C., kaj la sekvintan jaron vojaĝis al la Universala Kongreso en Antverpeno, Belgujo. Ĉeestis la 36-an Kongreson de EANA. Daŭre sekvas la agadon de EANA de sia nuna hejmo en Florido.

Walter August Buchheim: Komencis pri Esperanto en 1907 en la Kolegio de Kansas. Dum la jaroj 1912-1914 ĉeestis kurson en la germana urbo Dresdeno, kaj en 1913 ĉeestis la Universalan Kongreson en Bern, Svislando, kie li renkontis D-ron Zamenhof. Iam instruis kurson de Esperanto al skoltroj en Boulder, Col., kaj eldonis bultenon "La Inventisto". Servas kiel Delegito en Denver.

C. H. McKinney: En la aŭtuno pasintjare fariĝis 84-jara. Unue interesiĝis pri Esperanto en 1910 pro artikolo en ĵurnalo, kaj komencis studi sola. Post du tri monatoj entreprenis korespondadon kun samideanoj en 28 landoj. Depost 1910 estas membro de EANA, preskaŭ ĉiam kiel Patrono. Donas ĉiujare 10 donacabonojn de AE por bibliotekoj.

M. Whipple Bishop: En 1908 la pastro unue atentigis lin pri Esperanto pro artikolo en gazeto, "North American Review". Tuj skribis al la eldonisto kaj ricevis responde poŝtkarton kaj la numeron 1092, kiu indikis lian anecon en la Esperanta movado. Servis kiel UEA-Delegito dum 1914-1915. Dum la unua mondmilito eniris armeon kaj poste dum sekvintaj jaroj perdis kontakton kun la Esperanta movado. En 1949 pro agado en la religia movado "Unity", kaj pro multaj leteroj ricevitaj en Esperanto ĉe la Centro de tiu movado, li denove interesiĝis kaj realiĝis al EANA. Ĉeestis la 41-an Kongreson en Spencer, Iowa, kie *por la unua fojo* li aŭdis parolatan Esperanton kaj mem kuraĝis paroli. Nuntempe estas Help-Pastro de la movado "Unity" en Akron, Ohio.

Merton C. McConkey: En la jaro 1906 legis artikolon pri Esperanto en gazeto en kiu estis adreso de la Bostona Societo. Aĉetis lernolibron kaj tuj komencis studi la lingvon. Samtempe komencis propagandi ĝin en sia lernejo. Organizis kun kvin aliaj personoj (unu, Esperantisto el Rusujo) rondeton en Sioux City, Ia. Fariĝis prezidanto de la loka grupo. Instruis kursojn en Chicago, Detroit, Lansing. Estis ano de la loka komitato, kiu preparis la 29-an Kongreson de EANA en Detroit en 1936. Servas kiel Delegito en Lansing.

NOTO: Ni presos pli pri honoraj pioniroj de EANA en sekvontaj numeroj.



DEZIRAS KORESPONDI



Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Brazilo:** Brazila Koresponda Servo, Praça Carlos Gomes 288. *Curitiba.* serĉas kontakton kun korespondemuloj.
- Franĉujo:** F-ino Horault, 3 rue Leclerc Guillory, Angers (M. et L.) 30-jaraĝa fraŭlino deziras korespondi kun koleĝino.
- Germanujo:** Felix Baumgart, Blücherstr. 36, Berlin S. W. 29. Serĉas kontakton kun samideanoj el ĉiuj landoj. 39-jara.
- Hispanujo:** Esperanto-Grupo Moya, Forn, 19-1^o, Moya (Barcelona). Fine de majo ni okazigos letervesperon. 25 gejunuloj atendas leterojn.
- Hispanujo:** F-ino Angeles Jorge Exposito, Barriada de la Salud, Calle 5, n-ro 25, Santa Cruz de Tenerife, Kanariaj Insuloj. 16-jara, dez. kor.
- Hispanujo:** Angel Moreno Lara, San Blas 4, Baeza (Jaen). Deziras korespondi pri diversaj temoj kun fraŭlinoj.
- Japanujo:** Yasuyuki Suzuki, *Matuoka Sakai*, Sasima, Ibaraki. 18-jara studento dez. kor. per il. PK aŭ leteroj pri Usona vivo, lernejoj, ktp.
- Portugalujo:** F-ino Maria Alice Matins, Rua de Camoes 103, Porto. Deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.
- Turkujo:** Ali Ihsan Güvenç, As. Tbb. Ok. Ap. No. 71, *Beyazit-İstambul.* Dez. kor. pri literaturo, muziko, kaj belecoj de niaj landoj.
- Usono:** James Manix, 11 Linden Avenue, *Greenfield*, Mass. Deziras korespondi pri politiko, fotografado aŭ aliaj temoj.
- Usono:** D-ro S. B. Kahan, 1717 Bryant Ave., *New York* 60, N. Y. Deziras kontaktiĝi kun spertaj Esperantistoj por konversacio kaj praktikado de la lingvo. Telefono: DA 9-2230.
- Usono:** Henri Soudée, 2535 Belmont Rd., N. W., *Washington* 8, D. C. Katolikoj kiuj interesiĝas pri la Katolika Esperanta Movado povas skribi al li por plena informo.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1955

The Central Office has enjoyed serving the members of EANA during the past year. It is now time for many of you to renew your membership for 1955.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "associate membership" in the international association UEA. You receive coupons (called "membromarkoj") of UEA, and have a right to services of delegates throughout the world.

In addition there are "individual membership" categories in UEA: the *Yearbook* (containing lists of delegates) is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually.

Now is the time for you to renew your membership in your North American association EANA, and in the general international association UEA. Here are the combined membership rates for 1955:

	<i>Armed Forces, H. S. & College</i>	<i>Active Member</i>	<i>Patron Member</i>
EANA Membership & associate of UEA:	\$3.00	\$5.00	\$10.00
EANA Membership & <i>Yearbook</i> of UEA:	\$4.25	\$6.25	\$11.25
EANA Membership with <i>Yearbook</i> and magazine <i>Esperanto</i> of UEA:	\$6.00	\$8.00	\$13.00

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "Vinylite" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "Study Guide" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your *Esperanto Central Office*. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.